Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

9a jarkolekto n-ro 10
oktobro 1989

PROTOKOLO DE LA FEL-ESTRARKUNSIDO DE LA 28A DE OKTOBRO 1989

Ĉeestas: la estraranoj Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Roland Rotsaert (RR), Jos Vandebergh (JV) kaj Alex Humet (AH); krome ĉeestas Paul Peeraerts (PP).

1. Financa stato: La kostoj por membro-administrado daŭre altiĝas. Esperanto-Panorama fartas iom pli bone, ĉefe pro alfluo de anoncoj. La libroservo ĝenerale sukcesis altiri pli da mendoj ol pasintjare. La serio Stafeto kaŭzis malpli da enspezoj, pro manko de novaj titoloj. Grafiko: Laboroj por UEA estas same multaj kiel en 1988. Laboroj por aliaj Esperanto-organizaĵoj kreskis je 20 %, tiuj por ekstermovadaj instancoj je 25 %. Monato: Abonantaro altiĝis je 5 % kompare al 1988. Anoncoj por Monato iom falis. "La Jaro" restas zorgiga. Entute la financa situacio montriĝas pli sana ol en la pasinta jaro.

2. Donacoj: BEF jam ricevis permeson por fari atestilojn por la impostoj. FEL ankoraŭ ne.

3. Mortsel: La grupo de Mortsel malfondis sin. Gia havaĵo venis al FEL kaj estos aldonita al la kapitalo.

4. Materialo por la grupoj: Estas decidite, ke la grupoj aliĝintaj al FEL daŭre povos aĉeti ĉe FEL informan materialon kontraŭ la duono de la kostoprezo. La alian duonon pagu la Informa Fondaĵo de FEL. Pri la difino de "informa materialo" la estraro verkos kaj publikigos tekston.

5. Telefakso: La centro jam akiris sian telefaksilon. Por aĉeti duan (por la redaktoro de Monato) provizore ankoraŭ mankas mono. La donackampanjo daŭras. Ekestis vigla diskuto ĉu FEL mendu duan telefonlinion, speciale por la telefaksilo, aŭ uzu unu linion por telefaksilo kaj telefono. La punkto estas prokrastita ĝis venonta kunsido. Provizore la telefaksilo estas aŭtomate vokebla je n-ro (32 3)2 34 34 00 inter la 12.30 kaj 13.30 h,; la telefono (aŭ respondaparato) antaŭ kaj post tiu periodo.

6. Antaŭa protokolo: Sajne ne estis klara la punkto pri kotizoj (4). La kotizo por revuo Esperanto falas al 400 BEF. La kotizo de FEL restas je 400 BEF. Por la du do 800 BEF.

7. Esperanto-Panorama por blinduloj: Nora Moerbeek proponas, ke iu voĉlegu la revuon Esperanto-Panorama por blinduloj. JV esploros la eblecojn.

8. Nova dekreto pri subvencioj: En la estonto la ministerio ne plu subvencios FEL (kaj multajn aliajn organizajojn) laŭ la faritaj kaj pruveblaj elspezoj, sed laŭ okazigitaj kunvenoj kaj realigitaj publikajoj de FEL mem aŭ de ties grupoj. La grupoj devos pro tio, per speciala formularo, anonci siajn aktivecojn kun la pruviloj. Supozeble la subvenciado de FEL al la grupoj ankaŭ devos esti reviziata. La grupoj baldaŭ ricevos pliajn donitaĵojn.

9. Vojaĝo al Kubo: FEL organizos kune kun aliaj organizaĵoj aviadilan grupvojaĝon al la Universala Kongreso de Esperanto en Kubo. Detaloj sekvos. Personoj kiuj emas partopreni al tiu UK, jam antaŭ la 1a de Januaro enskribiĝu por la kongreso kontraŭ la favora tarifo. Aliĝilo kun indikoj en Belgaj frankoj, troviĝas en tiu ĉi "Informilo". FEL estas ekde tiu ĉi jaro kongres-peranto de UEA.

10. Péril Europe, asocio kiu inter esperantistoj provas akiri monon, ŝajne nun disvastigas Interlingua-n kaj iun "Novan Latinon". Homo avertita valoras du...

11. Vidbendoj: FEL disponas pri kelkaj Esperantlingvaj vidbendoj kiuj estas pruntepreneblaj de la grupoj. AH prizorgos la praktikan flankon de la pruntedonado. Petoj estu senditaj al la centro.

12. Standoj en borsoj: RR proponas, ke al borsoj ĉiam iru iu ŝranketo kun baza materialo: librolisto, jarlibro, PIV ktp. Venas kontraŭpropono, ke la deĵorantoj posedu liston de neforgesuminaĵoj. PP zorgos pri tio.

## PROTOKOLO DE LA INFORMA MEMBROKUNSIDO DE LA 28A DE OKTOBRO

Ĉeestas la kunsidon reprezentantoj de la grupoj de Bruĝo, Limburgo, Ostendo, Kortrejko, Gento kaj Loveno kaj krome de APE, FLEJA kaj BEFA. La kunveno estas ĉefe informa.

1. Libroservo: Membroj de FEL ricevis ĝis nun rabaton de 10 % aĉetante ion en la libroservo. Ekde la unua de januaro 1990 tiu rabato estos donita nur je samtempa aĉeto de "tri unuoj". Tri unuoj povas esti tri samaj aŭ malsamaj libroj, sed ekzemple ankaŭ unu libro, unu disko kaj unu pakaĵeto de glumarkoj. La kialo de tiu ŝanĝo estas la ĉiam plialtiĝantaj administraj kostoj.

2. Aĝlimo: Ekde 1990 membroj de FEL kiuj estas pli junaj ol 30 jaroj, aŭtomate estos membroj ankaŭ de la junulara organizaĵo FLEJA.

3. Subvencioj: Vidu punkton 8 de la ĉi-supra estrarkunsido.

4. Informa materialo: Vidu punkton 4 de la ĉi-supra estrarkunsido.

5. Kotizoj: Vidu punkton 6 de la ĉi-supra estrarkunsido.

6. Donacoj: Pro la fakto ke FEL ankoraŭ ne estis rerekonita kiel instanco kiu rajtas fari atestojn por la impostoj, estas klarigite ke provizore donacoj povas okazi al BEF, kiu jes rajtas eldoni tiajn atestojn. La kasisto de BEF aŭtomate plusendos ĉiujn donacojn de flandroj al FEL.

7. Esperanto-Panorama: La redaktoro de Esperanto-Panorama petis konsilojn, kritikoj, sugestojn ktp. rilate la enhavon kaj la formon de tiu ĉi revueto. Montriĝas ke neniu havas komentojn aŭ petojn. La sekretario klarigas ke ekde 1990 la revueto havos 4 paĝojn pli.

8. Oficiala FEL-stilo: En 1986 FEL decidis pri oficiala stilo de ĉiuj siaj dokumentoj, leterpapero, informa materialo ktp. Tio ĉi okazis post longaj konsultiĝoj kun profesiaj reklamkonsilistoj. La FEL-stilo antaŭvidas unu simbolon (la t.n. jubilean simbolon), specialajn litertipojn kaj unu difinitan verdon (la t.n. Pantone 389). Same kiel ekz. Shell ĉiam uzas flavan konkon (kaj neniu benzinvendisto venas al la ideo reklami Shell per rozkolora mitulo...), almenaŭ en Flandrio ĉiu reklamu Esperanton nur per la akceptitaj simbolo kaj koloro. Kelkaj aliaj Esperanto-organizaĵoj (ILEI, TEJO, JEFO, ...) jam sekvas la proponojn por krei unuecan bildon pri Esperanto tra la tuta mondo.
Montriĝas ke jen kaj jen grupo tamen kreas variaĵojn pri tiu stilo, jen mem kreante iun simbolon, jen uzante la oficialan sed en alia koloro. Denove FEL atentigas ke tiu unueca bildo estas vera nepraĵo por sukcesi reklamkampanjojn. Laŭ statistikoj homoj ĝenerale legas iujn informilojn nur kiam ili **rekonas** la formon kaj memoras ke ili jam antaŭe vidis ĝin.
La sekretario insiste petas al ĉiu sekvi tiujn gvidliniojn kaj ne malutili al laboro pene farita dum tri jaroj. Estas krome klare ke FEL pretas subvencii inform-materialojn kiujn la grupoj aŭ individuoj uzas, nur se ili estas konformaj al la cititaj reguloj.

9. Regularo pri prelegvojaĝoj: Ĝis nun la kostoj de la prelegvojaĝoj de eksterlandaj gastoj estis sufiĉe arbitre dividitaj de la grupoj. Estas proponate, ke FEL nun antaŭpagu ĉiujn kostojn, kaj dividu ilin poste tra ĉiuj grupoj kiuj organizis la koncernan prelegon. Pri tio aperas regularo en tiu ĉi numero de "Informilo".

10. Vojaĝo al Kubo: Vidu punkton 9 de la ĉi-supra estrarkunsido.

11. Vidbenda servo: Vidu punkton 11 de la ĉi-supra estrarkunsido.

12. Instruado: Alex Humet prilumas la rezultojn de enketo inter la instruantoj de Esperanto en Flandrio. En 10 bazaj kursoj 99 homoj eklernis inter kiuj 71 finis. En 5 mezaj kursoj 28 lernantoj ekstudis inter kiuj finis 18 kaj en 4 superaj kursoj 26 komencis kaj 20 eltenis ĝis la fino. Uzataj estis la jenaj lernolibroj: en 2 kursoj Kempeneers (elĉerpita kaj ne represota), en 2 "La komencanto" (elĉerpita sed reeldonota de FEL) kaj en 2 Keefe (eldonota de FEL).

*Provis protokoli: Paul Peeraerts*

## REGULARO DE FEL PRI RONDVOJAĜOJ DE PRELEGANTOJ.

1. La respondeculo pritraktas proponojn, kontaktos la grupojn, faras kun ili interkonsenton pri dato, temo, gastigado, partopreno en la vojaĝ- kaj aliaj kostoj, informos la preleganton kaj helpos la grupojn por akiri lastmomentajn informojn.

2. La grupoj estos principe informitaj per cirkulero de la sekretario pri ĉiuj konataj detaloj pri la prelegvojaĝo. Ili prefere telefone avertu la respondeculon, se ili volas inviti preleganton, kaj poste skribe konfirmu tion.

3. Ĉiu grupo devas pagi antaŭe interkonsentitan sumon al FEL. Tiu sumo estos principe egale por ĉiuj grupoj kaj servos por kovri vojaĝkostojn, administrajn kostojn, ev. asekuron (se ni respondecas pri la invitito) kaj eventuale honorarion. La grupo do NE pagu monkompenson al la preleganto mem. Laŭbezone la estraro de FEL povas fari esceptan aranĝon por finance malforta grupo.

4. Ĉiu grupo krome zorgu por la akcepto de la gasto, gastigado (= manĝoj + tranoktado) kaj helpo por ĝustatempe atingi la venontan grupon.

5. La respondeculo pri rondvojaĝoj estas:
Hilde Van Ingelgem, Arbeidsstr 21, 9300 Aalst - tel.: 053/70 50 11.

## STATISTIKO PRI ESPERANTO EN LA KOMUNIKILOJ.

JAROJ 87/88/89 (ĝis komenco de okt).

| MONATO | MENCIO | MALGR.ART. | GRANDA | RADIO+TV |
|---|---|---|---|---|
| Januaro | 0/2/0 | 3/3/0 | 2/4/0 | 11/0/0 |
| Februaro | 0/3/4 | 6/0/0 | 10/9/0 | 4/0/0 |
| Marto | 0/4/1 | 7/1/1 | 8/2/0 | 5/0/0 |
| Aprilo | 0/6/0 | 4/4/0 | 4/2/0 | 0/0/0 |
| Majo | 0/5/1 | 6/4/0 | 0/3/1 | 0/0/0 |
| Junio | 0/1/1 | 9/4/5 | 7/5/5 | 2/0/0 |
| Julio | 0/4/1 | 9/4/4 | 3/5/14 | 0/0/0 |
| Aŭgusto | 2/0/4 | 11/5/7 | 3/6/8 | 0/1/0 |
| Septembro | 3/1/6 | 7/2/5 | 8/4/6 | 3/1/1 |
| Oktobro | 7/3/ | 11/6 | 4/3 | 1/0 |
| Novembro | 0/1/ | 2/2 | 3/1 | 0/0 |
| Decembro | 14/1/ | 0/1 | 10/2 | 3/2 |
| SUMOJ | 26/31/18 | 75/36/22 | 62/46/34 | 30/4/1 |

Jus post la registrado de ĉiuj ricevitaj eltranĉaĵoj alvenis ankoraŭ dika fasko da ili. Tamen oni povas konstati konstantan sinkon depost la jubilea jaro. Ni alvokas ĉiujn, kiuj aktivas en sia loka klubo por pli atenti la informadon de la komunikiloj. En ĉiu informa stando ni aŭdas la saman rimarkon de simpatiantoj: "Kial oni tiel malmulte aŭdas pri Esperanto?"